

Josip Pleadin

LA TRADICIO DE ESPERANTO EN KROATIO KIEL NEMATERIA KULTURA HEREDAĴO

(Prelego filme prezentita dum la 6-a Internacia Simpozio kun la temo
135 jaroj de Esperanto: homoj, lingvo, kulturo kaj eventoj, organizita de
Eŭropa Centro de Interkultura Edukado el Vroclavo, la 26-an de julio 2022)

Saluton al ĉiuj spektantoj el Kroatio, la dua lando kiu Esperanton protektis kiel sian nematerian kulturan heredaĵon. Mi estas Josip Pleadin, sekretario de Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, kaj mi havas la honoron konigi al vi la temon „La tradicio de Esperanto en Kroatio kiel nemateria kultura havaĵo”. Mi dankas al vi pro la interesiĝo pri tiu ĉi temo, sed samtempe mi bedaŭras, ke pro mia foresto, vi povos spekti nur filmitan prelegon, sen ebleco starigi demandojn, interŝanĝi opiniojn kaj informiĝi pri la klopodoj protekti Esperanton kiel nematerian heredaĵon en aliaj landoj okaze de ĝia 135-a datreveno.

Nu, kiel multaj el vi scias, jam delonge ekzistas la ideo proklami Esperanton kiel mondan kulturan heredaĵon kaj proponi ĝin por la listo de Unesko. Ne mirinde, ĉar se ekzistas iu pli grava internacia organizaĵo kun kiu esperantistoj kaj iliaj organizaĵoj flegas ian oficialan rilaton, ĝi estas sendiskute Unesko. Vi certe memoras, ke la ŝlosilan rolon en Unesko rilate la kunlaboron kun esperantistoj, ludis la kroato Ivo Lapenna, kiu en 1954 en la Ĝenerala konferenco de Unesko, okazinta en Montevideo, argumentis kaj pledis por Esperanto. Kaj kvankam la tiea atingo por iuj esperantistoj ŝajnis tro magra, ĝi tamen estis la unua tia sukceso, kiu daŭras ĝis nun.

Tiuj, kiuj konas la evoluon de Esperanto en la limoj de eksa socialisma Jugoslavio scias, ke la plej forta bastiono de Esperanto en la tiama komuna ŝtato de sudslavoj, certe estis Kroatio kun sia ĉefurbo Zagrebo. Por ne detaligi la aferon, mi menciigu nur, ke do ne surprizas la fakto, ke post Pollando, kie Esperanto aperis en 1887, Kroatio estas la sola lando kiu atingis similan gradon de protekto de Esperanto.

En la limoj de Kroatio, ekde la komenco Esperanto estis konsiderata escepta kultura fenomeno, kiu enlande forte enradikiĝis kaj havis vere riĉajn sukcesojn. La unuaj esperantistoj sur la nuna teritorio de Kroatio estis menciitaj jam en la Zamenhofaj adresaroj. Vere la plej unuaj estis la t.n. „osijeka kvinopo”, fakte kvar virinoj kaj unu viro el la orientkroata urbo Osijek (tiam nomita Esseg), kiuj en la adresaroj de Zamenhof aperis en 1889, do nur du jarojn post la apero de la „Unua libro”. La unue menciita esperantistino estas sinjorino Marija Pilepić, kies tombo troviĝas en la Urba tombejo de urbo Opatija. Ĝi estas protektita kaj prizorgata de Esperanto-societo Rijeka kaj sur ĝi staras dulingva memortabulo. El la organizaĵoj oni certe devas menciigi la unuan, kvankam mallongdaŭran Adriatikan Ligon Esperantistan, kiu estis fondita en Rijeka en 1907. Sekvis Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj, fondita en 1908 en Zagrebo kaj la samnoma Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj, fondita en 1909 en Bjelovar. La zagreba Unuiĝo, kies gvidaj personoj estis la kolonelo Mavro Špicer kaj instruistino Danica Bedeković, havis la gravegan rolon en la evoluo de Esperanto ne nur en Zagrebo, ĉar Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj fariĝis fakte la unua organizaĵo kun landskala signifo. Kvankam ĝi funkciis nur ĝis la Unua mondmilito, do efektive 4 aŭ 5 jarojn, ĝi eldonis la unuajn lernolibrojn kaj la unuajn vortarojn, kaj ankaŭ la unuan gazeton „Kroata Esperantisto”. La laboron de Unuiĝo de Kroataj Esperantistoj, post la Unua mondmilito daŭrigis Zagreba Esperantista Societo, fondita en 1919,

el kiu sekvis fondo de Sudslava Esperanto-Ligo en 1922 kiel antaŭulo de Kroatia Esperanto-Ligo, fondita en Zagrebo en 1945. Kroatia Esperanto-Ligo en sia unua kroatlingva titolo nomiĝis Savez esperantista Hrvatske. Poste ĝi ŝanĝis la nomon al Savez za esperanto Hrvatske (kvankam la Esperanta nomo restis Kroatia Esperanto-Ligo). Nuntempe ĝi nomiĝas Hrvatski savez za esperanto aŭ Kroata Esperanto-Ligo, kiu tian nomon ricevis post la sendependiĝo de Kroatio, okazinta en 1991.

La enlanda Esperanto-historio en Kroatio povas esti dividita en kvar periodojn. La unua estis la pionira periodo antaŭ la Unua mondmilio, la dua estis la tempo inter la du mondmilitoj, la tria estis la socialisma epoko ĝis 1991, kaj la kvara periodo, kiu ankaŭ nun daŭras, komenciĝis post la sendependiĝo de Kroatio en 1991.

En la unua periodo temis pri granda entuziasmo. Tiam estis markitaj la movadaj celoj, kaj la movado estis ĉefe burĝa, kun multaj bonstataj kaj bonedukitaj homoj. En tiu periodo aperis ankaŭ la unua libroforma traduko de literaturaĵo el la kroata. En 1911 Fran Kolar Krom aperigis la tradukon de la romano „La trezoro de l' orajisto” de populara verkisto August Ŝenoa. En 1913 aperis ankaŭ alia grava traduko, respektive „Konfeso” de Milka Pogačić, kiun Esperantigis instruistino Antonija Jožičić el Kostajnica (nuntempe Hrvatska Kostajnica, situanta apud la kroatia-bosnia landlimo). „Konfeso” fariĝis la unua verko el la kroata, kiu atingis la ĉinan kulturon, ĉar pere de la Esperanta eldono ĝi estis retradukita en la ĉinan kaj publikigita en la jaro 1931.

En la periodo inter la du mondmilitoj, la enlanda movado komencis intense transformiĝi. El preskaŭ ekskluzive burĝa movado, ĝi fariĝis grandparte klasa laborista movado, ĉar laboristoj komencis amase lernadi Esperanton, membriĝi en esperantistaj societoj kaj eĉ fondi apartajn laboristajn societojn kun maldekstrulaj kaj revoluciaj tendencoj. Tio aparte sentebliis post la Dua kongreso de Komunista partio, okazinta en Vukovar en 1921, kiu akceptis specialan Rezolucion pri Esperanto. Tio kaŭzis eksmembriĝon de pluraj burĝaj esperantistoj, inter kiuj estis multaj judoj. El tiu transformiĝo de la movado, sekvis ankaŭ la opinio, ke la esperantista movado fakte estas kaŝata komunista movado, kio estis grandparte malĝusta. Tamen, multaj policaj dokumentoj konfirmas, ke en la periodo inter la du mondmilitoj okazadis persekutoj de esperantistoj, speciale de tiuj kiuj apartenis al la klasbatala alo de la movado, respektive de tiuj, kiuj apartenis al la laborista movado. Okazadis traserĉado de domoj, konfiskado de libroj kaj dokumentoj, enpizonigo, kaj fine ankaŭ malpermeso de Esperanto.

En 1941 fondiĝis la kvislinga kaj faŝisma Sendependa Ŝtato Kroatio, kiu havis du flankojn. La unua estis forta evoluo de diversaj kulturaj movadoj kaj projektoj, sed aliflanke temis pri ekstermado de aliaj nacioj, ĉefe judoj pro la rasaj leĝoj enkondukitaj influe de Germanio, kaj de komunistoj pro la politike malsamaj vidpunktoj. Pro tio inter la unuaj en la reĝima listo de malamikoj troviĝis ankaŭ esperantistoj. El tiu tempo konatas la heroeco de kroataj esperantistoj, kiuj ekzemple, gviditaj de Ivo Lapenna, sukcesis savi la listojn de zagrebaj esperantistoj, antaŭ ol la polico venis en ilian sidejon. Esperantistaj societoj estis malpermesitaj kaj esperantistoj parte persekutataj kaj parte aliĝintaj al la naciliberiga batalo, gvidita de la partizana armeo. Tiu armeo fariĝis kontraŭulo de la oficiala Sendependa Ŝtato Kroatio, kaj ĝin gvidis la denaska kroato Josip Broz, nomita Tito. Dum la Dua mondmilito la partizana armeo grave fortiĝis kaj fine de la milito troviĝis en la alianco de militvenkintoj. Dumilite pereis diversmaniere multaj esperantistoj, pri kiuj poste aperis memorlibro „Honore al ili”, en kiu estas menciitaj ĉirkaŭ 300 nomoj de falintaj jugoslaviaj partizanoj, kiuj estis esperantistoj.

La fakto, ke esperantistoj dumilite estis tre aktivaj, helpis la pozicion de Esperanto en la postmilita epoko, ne nur en Kroatio, sed ankaŭ en la tuta Jugoslavio. Sindikatoj, laboristaj kaj kulturaj organizaĵoj en tiu periodo organizadis diversajn aktivecojn de esperantistoj kaj gvidis iliajn kursojn. Multe helpis ankaŭ la fakto, ke favore al Esperanto parolis la ŝtatprezidento Tito, kiu publike deklaris, ke li lernis Esperanton en la malliberejo de Maribor, kune kun aliaj

maldekstruloj. Grandan spronon al Esperanto donis la 38-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Zagrebo en 1953, sub alta protekto de Vladimir Bakarić, la tiama prezidanto de la kroata registaro. La kongreso estis verŝajne la plej granda internacia aranĝo en Jugoslavio tiutempe, kiu akiris enormajn simpatiojn de politikistoj kaj medioj.

Ene de kelkaj postkongresaj jaroj, la Esperanto-movado fariĝis ĝenerale konata fakto, akceptata kaj flegata de la jugoslavia socio, sed, ĉar nenio daŭras eterne, ankaŭ ĝia forto iom post iom malkreskis, aparte en kaj post la amasmovada jaro 1968. Ioma plifortiĝo okazis komence de la 1970-aj jaroj, aparte post la fondo de Internacia Kultura Servo (IKS), la unua profesia Esperanto-entrepreno, kiun en Zagrebo iniciatis kaj en 1972 fondis junaj esperantistoj el Studenta Esperanto-Klubo. Dum la sekvaj 10-15 jaroj IKS fariĝis grava motoro de Esperanto, kaj ĝia sidejo troviĝis en la kulta urbocentra loko de kroata esperantismo, en la strato Amruševa 5. IKS okupiĝis pri organizado de movadaj aranĝoj, eldonado de libroj, organizado de kursoj, vojaĝoj, kaj ĝi estis pli-malpli oficiala firmao kiu plenumis la laborojn por Kroata Esperanto-Ligo, de kiu ĝi grandparte estis pagata. Ĝuste en tiu periodo, kaj grandparte pro la laboro de la IKS-anoj, fortiĝis la ligoj inter esperantistoj kaj socipolitikaj organizaĵoj, el kiuj plej gravis la kunlaboro kun la Asocio de socialisma junularo, la plej forta amasa junulara soci-politika organizaĵo, protektata de la ŝtato. En la jaro 1976 esperantistoj atingis la gradon de socia protekto en formo de „socia organizaĵo”, kiu estis „kolektiva membro de socialisma junularo”. Tio efektive signifis, ke esperantistoj kune kun kelkaj aliaj junularaj organizaĵoj akiris socian reputacion kaj la protekton de la ŝtato, kaj tia pozicio en la socio signifis pli facilan financadon kaj agadon, kiun subtenadis la ŝtato pere de siaj ministerioj, fondusoj kaj soci-politikaj organizaĵoj. En tiu periodo la movado draste plijuniĝis kaj amasiĝis, sed la kvanto de junaj esperantistoj ne signifis ankaŭ kvalitan kreskon. Tamen, la esperantista movado fariĝis tre valora kultura elemento. Eĉ nuntempe oni publike agnoskas plurajn ĝiajn atingojn. Ekzemple, la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF), tre grava aranĝo en Zagrebo, iniciatita de esperantistoj en 1968, kaj ekde 1972 organizata de IKS, ankoraŭ funkcias, kvankam sen Esperanto. Ekzistas ankoraŭ eĉ IKS mem, sed ĝi ŝanĝis la nomon kaj ne plu estas Esperanta firmao. En la 1960-aj jaroj esperantistoj el la Astronomia observatorio de Zagrebo iniciatis turismon en nuntempe tre grava turisma loko Primošten ĉe la Adriatika marbordo. Dum jardekoj (ekde 1953 ĝis 1992) Radio Zagrebo havis regulan Esperanto-elsendon. Esperanto estis instruata en la Ekonomia fakultato de Zagrebo, kaj spuroj de tio eĉ nuntempe ekzistas en la Germana fako de la Filozofia fakultato de Zagrebo, kie profesoro Velimir Piškorec gvidas kolecion pri planlingvoj, kun inkluzivita Esperanto.

Aparte fieraj kroataj esperantistoj estas pro sia literatura agado. Aperis multaj tradukoj en gazetoj aŭ kiel apartaj libroj, inkluzive de kelkaj antologioj. Esperantistoj peradis ankaŭ en la tradukado de kroataj literaturaĵoj al aliaj lingvoj, ĉefe aziaj. Aperadis la literatura revuo „Most” (Ponto), kiu regule publikigis ankaŭ tradukaĵojn ekestintajn pere de Esperanto al aliaj lingvoj, aŭ en Esperanto mem.

Jam antaŭ kelkaj jarekoj kroataj esperantistoj komprenis, ke oni devas konservi la heredaĵon de Esperanto kiel apartan socian kaj kulturalan fenomenon en Kroatio. Tiuj klopodoj komenciĝis per la agado de individuoj, el kiuj plej grandajn penojn faris la zagreba esperantisto Marinko Gjivoje. Bedaŭrinde, la klopodoj por organizi esperantistan arkivon, plurfoje komencitaj, nur lastatempe donis konkretan rezulton, ĉar en 2010 estis fondita Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac, kiel komenco de sistema kolektado kaj arkivado de dokumentoj kaj faktoj pri Esperanto. En la komenco temis pri individua iniciato, kiun poste akceptis kelkaj kunlaborantoj, kaj nuntempe jam ne ekzistas dubo, ke DEC fariĝis la ĉefa loko por konservi kaj protekti la esperantistan heredaĵon en Kroatio.

Ekde la sendependiĝo de Kroatio (do ekde 1991), la ŝtato financis la agadon de esperantistoj, ĉefe de Kroata Esperanto-Ligo pere de la Ministerio pri kulturo, sed tiu sistemo de financado iomete modifiĝis, kaj proksimume ekde la jaro 2013 ĝi funkcias nur sur la nivelo

de financado de projektoj. Pro tio la afero de financado fariĝis ne tiel stabila kiel antaŭe, kaj tio kaŭzis problemojn al tiuj esperantistaj organizaĵoj, kiuj ne povis rapide adaptiĝi. La ideoj pri konstruado de aparta domo por la esperantista arkivo ekzistis multe pli frue, kaj la unuaj paŝoj tiucelen komenciĝis jam en 2009, kaj intensiviĝis post la fondo de DEC en 2010. En 2016 Kroata Esperanto-Ligo komencis trakti kun la Fako por etnografia kaj nemateria kultura heredaĵo de la Ministerio pri kulturo la ideon pri oficiala listigo de Esperanto kiel nemateria kultura havaĵo de Kroatio, sed la afero ne iris glate, ĉar la Ministerio opiniis, ke pri la listigo de Esperanto, kiu estas universala kaj ne nur nacia lingvo, sian opinion devas doni speciala komisiono. Preskaŭ samtempe kun tia opinio de la Ministerio, per mondonacoj de eksterlandaj esperantistoj komenciĝis la konstruado de la domo por la bezonoj de la nacia Esperanto-arkivo en Đurđevac. La laboroj komenciĝis en septembro 2017, kaj du jarojn poste, en septembro 2019, estis oficiala inaŭgurita la sidejo de Dokumenta Esperanto-Centro, kiu tiutempe estis ankoraŭ nefinita. Sed ĝia inaŭguro koincidis kun la decido de la Ministeria komisiono, per kies dokumento de la 11-an de februaro 2019 Esperanto ricevis gravan socian rekonon en Kroatio. Per tiu dokumento de la Administrejo pri protekto de kultura heredaĵo, kiu funkcias ĉe la Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio, „la tradicio de Esperanto en Kroatio” ricevis la statuson de nemateria kultura havaĵo kaj estis notita en la Registro de kulturaj havaĵoj sub la numero Z-7298.

La administrejo pri protekto de kultura heredaĵo preskribis aron da taskoj por konservi, diskonigi kaj protekti la menciitan havaĵon kaj eviti ĝian malaperon aŭ detruon. En ĝia dokumento troviĝas listo de 24 organizaĵoj taskigitaj protekti la menciitan nematerian kulturalan havaĵon, kiuj transprenis ĉiujn preskribitajn taskojn.

El la disponeblaj dokumentoj videblas, ke la iniciaton por listigi Esperanton kiel nematerian kulturalan havaĵon de Kroatio donis la irlanda diplomato Seán Ó Riain, kaj ke tiun iniciaton Kroata Esperanto-Ligo prezentis al la Ministerio pri kulturo. El la klarigo pri tiu temo, legebla en la dokumento de la 11-a de februaro 2019, rekoneblas la verka stilo de profesoro Velimir Piškorec, kiu fake prezentis la aferon. La respektiva Komisiono pri nemateria kultura heredaĵo dum sia kunsido de la 29-a de majo 2017 juĝis, ke la tradicio de Esperanto en Kroatio havas karakterizojn de nemateria kultura havaĵo laŭ la difinoj de la Leĝo pri protekto kaj konservado de kultura heredaĵo. Surbaze de tia opinio, la Faka komisiono por prijuĝo de la ecoj de kultura havaĵo, dum sia kunsido de la 18-a kaj 19-a de decembro 2018, konfirmis tiun prijuĝon de la Komisiono.

Kiel argumentoj por listigo de ĉi tiu lingvo en la Registro de kulturaj havaĵoj de Respubliko Kroatio estis akcentita la rolo de Esperanto kiel lingvo por promocio de la kroata kultura, arta kaj literatura heredaĵo kaj ĝia nuntempa literatura produktado.

La esperantistaro aklame akceptis tiun statuson kaj nuntempe klopodas plenumi la transprenitajn taskojn. En la konkursoj de la Ministerio pri kulturo kaj medioj por 2021, estis aprobitaj du projektoj de Kroata Esperanto-Ligo pri ciferecigo de materialoj, kaj en 2022 estas aprobita ankaŭ la unua projekto de Dokumenta Esperanto-Centro, kiu celas ciferecigi 4200 paĝojn de la gazetoj „Konkordo” kaj „La Suda Stelo” kaj disponigi ilin al nacia kaj internacia publikoj. Tiu projekto devus finiĝi ĝis la Zamenhofa tago, la 15-an de decembro 2022.

Dankon pro via atento, kaj se vi havas demandojn kaj komentojn, aŭ se vi volas ricevi la tekston de ĉi tiu prelego, bonvolu skribi al dec.kroatio@gmail.com